

## *La Demando pri la Egoo*

Pothapada-Suto (Digha Nikajo 9)

ポッタパーダ経

tradukis **Geo Yoxon**, Britio

Iam, kiam la Honorato loĝis ĉe Savathio, okaze li preterpasis tie, kie Pothapado interparolas kaj argumentas kun kelkaj asketoj vagantaj. Ekvidinte la Beatulon, Pothapado signis al la ĉeestantoj, ke ili ĉesigu la kvereleman disputmanieron dirante, "Jen venas Gotamo kaj, se ni ŝajnas kviete debati, povas esti ke li konsentos partopreni kun ni." Kaj al la Honorato preterpasanta li vokis: "Ĉu la Altestimato bonvolos sidiĝi inter ni? Jen loko preta." Kaj la Budho sidiĝis.

"Pri kio vi ĉiuj diskutas, Pothapado?" demandis la Tathagato.

"Ho, tio malmulte gravas, sinjoro," respondis Pothapado. "Ni jam ne ĝenu nin pri ĝi. Pli volonte ni aŭskultu paroladon de la Altestimato pri la naturo de la konscio, pri la fariĝo kaj la foriĝo de la ideoj, pri la demando pri la egoo. Iuj instruantoj asertas ke la ideoj estiĝas spontane sen kaŭzo, aliaj instruas ke la konscio estas kaŭzo-radiko de ĉiuj psikaj statoj ke ĝi ja estas mem egoo. Sed aliaj instruas la neekziston de la egoo, kaj ni volas scii kiel la Altestimata Gotamo rigardas tiujn aferojn."

"Nu, Pothapado, rilate al la ideoj, tiuj fariĝas kaj foriĝas laŭ la normala funkcio de kaŭzo kaj rezulto. Estas kialo kaj kaŭzo por la estiĝo de pensoj kaj mensaj statoj, en ĉiu okazo. Sed estas ideoj, kiuj farigas kaj foriĝas per ekzercado de la menso. Ili rezultas el disciplino kaj memregado. Kaj kio estas tiu ekzercado?"

"Homo, kiu alpranas la vivon de sanghano, ekzercas sin en moraleco, boneco, prava vidpunkto, kaj memregado, venkas sian naturon pasiecan, regas siajn sentojn, kaj feliĉe vivas sola kaj alkroĉiĝanta al nenio. Forigante ĉiujn malhelpojn al sia evoluo, tia homo elradias ĝojojn kaj pacon, kaj en taŭga tempo li atingas la povon eniri en la kvar statojn de ekstazo. Ĉe la unua li ĝuas staton senĝenan pro senameco sed kun la racio ankoraŭ vigla kaj agema. Ĉe la dua li venas al stato de plena paco kaj ĝojo, libera de demandemo kaj exploremo. Ĉe la tria li atingas staton de feliĉo en kiu li konscias plenan trankvilon de la menso. Ĉe la kvara li spertas staton liberan de ĝeno aŭ facilo, konscianta puran aplombon, senĝojan, tamen tute sen kono de malbono, ebenan kaj kompletan.

"Kaj jen, la sanghano, pasanta preter la konscio de forno, kunkonsciiĝas kun la senlimeco de spaco kaj menso, kaj komprenas malplenecon. Li atingas konon de tio, kio estas preter ĉia pensado kaj formetas ĉiujn ideojn kaj konceptojn, atingante la pinton de ĉiuj mensaj statoj, kaj preterpasante ilin. Tiel, Pothapado, iom post iom okazas forpaso de ideoj."

"Do, sinjoro, ĉu la konscio estas identa kun la egoo, aŭ ne?"

"Nu, Pothapado, kion vi nomas la egoo?"

"La egoo mi supozas esti, sinjoro, aŭ io el partoj kaj tiel plu, aŭ io nemateriala el menso, kaj kompleta en si. Povas esti ke ĝi estas sole el konscio, senforma kaj malplena. Sed, kio ajn ĝi estas, mi volas ke la Altestimato deklaru ĉu la egoo estas konscio aŭ preter konscio."

"Tiu estas afero malfacile komprenebla de vi, Pothapado, ĉar vi edukiĝis laŭ malsimila sistemo de instruado, kaj vi vin kroĉas al ideoj kaj opinioj, kiuj apartenas al tiu sistemo. Tial mi ne povas doni al vi klaran respondon, kaj, efektive, pri tiu ĉi afero mi ne estas iam espriminta opinion. Ankaŭ mi ne esprimas opiniojn responde al demandoj pri la senlimeco, aŭ male, de la mondo, aŭ egoo estas identa kun la korpo aŭ ne. Pri ĉiuj demandoj tiaj, pri kiuj emas paroli kaj diskuti vi kaj viaj amikoj, mi ne donas opinion. Kaj kial? Ĝuste pro tio, ke ili ne estas profite diskutablaj, kaj ili ne rilatas al la Doktrino, kiun mi instruas. La solvoj de tiuj problemoj neniel helpas al liberiĝo, al prava vivmaniero, kaj al puriĝo de avido. Ili ne helpas al prava kompreno kaj vera scio. Tial mi ne donas opinion pri ili."

"Estante tiel, do, kion la Altestimato instruas?"

"Mi instruas, Pothapado, ke ekzistas sufero. Mi montras la kaŭzon de sufero, kaj mi instruas sensuferiĝon. Mi anoncas la vojon, kiu kondukas al la ĉesiĝo de sufero."

"Kaj kial la Altestimato instruas tiajn aferojn?"

"Kial? Ho Pothapado! Tial, ke prava kompreno de tiuj aferoj kondukas al pura konduto, al ne-alkroĉiĝo, al kvieteco, al vera scio, kaj al la kleriĝo kiu gvidas al Nirvano."

"Jes, vere, Altestimato. Jes, ja vere."

Tion dirante Pothapado aplaudis la parolon de la Honorato de la mondo, kaj tiu leviĝis kaj foriris.

Tiam la asketoj kaj aliaj aŭskultantoj sin turnis al Pothapado kun moko kaj insultoj, dirante: "Jes, vere! nu, kompreneble! Pothapado aprobas ĉion, kion diras Gotama al li. Per lia 'Jes, vere, Altestimato! Ha, vere, Altestimato!' li konsentas al tio kaj al ĉi tio, senesploro. Nu, ni ne konsentas al la vortoj de Gotamo, kaj ni ne povas rimarki, ke li ion ajn diris rilate al la punktoj proponitaj."

"Nu, efektive," respondis Pothapado, "mi ankaŭ ne rimarkis ke la Sankta Gotamo ĝuste klarigis la proponitajn punktojn, sed li proponas metodon por lumiĝo kaj la atingo de kleriĝo, bazatan sur la instruado sia, kaj certe realigeblan pere de tiu instruado kaj disciplino. Pro tio, kial mi ne aprobu kaj aplaudu tion, kion diris la Sankta Gotamo?"

Post kelkaj tagoj Pothapado, kune kun Cito, filo de la elefandrestisto, serĉis la Honoraton de la mondo. Alvenante ĉe li ili salutis lin respektplene. Ili rakontis al li, kiel la asketoj malestimis lian parolon kiel nerespondantan al la punktoj proponitajn. La Budho diris, "Tiuj homoj estas blindaj. Ili ne povas vidi. Kelkajn aferojn mi anoncas kiel veraj, nome, la kvar verojn pri sufero; kaj aliajn mi anoncas kiel nediskutindaj. Nun ni plue prikonsideru la aferon."

"Iuj homoj opinias pri la egoo, ke ĝi vivadas post la morto de la korpo, en stato de feliĉo perfekta. Mi estas demandinta de ili, sed mi ne povas ricevi klaran difinon de ilia scio pri postmortaj statoj. Ili ne povis diri al mi pri iu loko aŭ stato de perfekta ĝojo, persone konata de ili; ili nek povas prezenti ateston pri tiuj statoj. Sekve, mi devas rigardi kiel vanaj iliajn teoriojn. Tiaj personoj konstruas mirindan ŝoseon kiu kondukas kien ninu scias! Ili ne povas garantii la realecon de ilia celo! Ĉu ne frapas vin tio, kiel sensaĝa ĝi estas?"

"Jes, sinjoro, tiel ŝajnas."

"Nu, Pothapado, ordinare tri eblaj difinoj de persona egoo estas supozeblaj. La unua estas materiala, laŭ kiu la egoo estas imagata kiel korpo kun partoj kaj formo. La dua estas nemateriala, imagata el mensaĵo, tamen kun formo. La tria estas senforma, imagata kiel nur el konscio. Mi instruas doktrinon, kiu rilatas al ĉiuj tri teorioj. Mia instruo kondukas al demeto de personeco, tiel ke ĉiuj sentaŭgaj emoj forfalas, ĉiuj bonintencoj efektiviĝas, kaj efektiviĝas stato de perfekta saĝo. Ne opiniu, Pothapado, ke kiam plenumiĝas tiu efektiviĝo, malĝojo kaj sufero ankoraŭ restas. Tiel ne estas. Ĉar, je la atingo de saĝeco, estas ĝojo, feliĉo kaj paco; kaj je la atingo de neŝancelanta prava pripenso kaj memregado, estas nur trankvile kaj plenĝoje.

"Kaj, se iuj demandas kiel kaj kio estas ĉi tiu materiala aŭ nemateriala, aŭ senforma personeco, pro kies demeto ĉi tiu doktrino estas predikata, mi respondas, ke ĉi tiu personeco estas ja ĉi tiu jen vidata! Tiu ĉi instruo ne estas vojo kondukanta al nekonata celo, ĉar mi montras kiel ĝi kondukas, tiel ke, homo kiu iras laŭ la Vojo, povu kompreni kaj eksperti la plenumon de saĝeco."

Tiam Cito, filo de la elefandrestisto, diris al la Beatulo, "Sinjoro, el kiu speco de personeco vere konsistas la homo? Ĉu el la materiala, la nemateriala, aŭ la senforma? Ĉu el ĉiuj tri?"

"Se iu demandus vin, Cito, ĉu pasinte vi ekzistis aŭ ne, aŭ ĉu estonte vi ekzistos, kiel vi respondus?" replikis la Beatulo.

"Mi dirus, ke pasinte mi ekzistis, nun ekzistas, kaj certe ekzistos estonte, sinjoro."

"Nu, Cito, ĉu ankoraŭ estas reala por vi via personeco pasinta? Ĉu jam estas reala por vi via personeco estonta? Aŭ ĉu sole estas reala por vi la nuna personeco, kaj nereala la aliaj?"

"Mia personeco pasinta estis reala por mi tiam, kiam ĝi ekzistis, sinjoro, kaj sufiĉe reala estos por mi estonta tiam, kiam ĝi venos. Sed nun ili ambaŭ estas nerealaj, kaj sole la nuna personeco estas reala por mi, ĝuste je la nuna momento."

"Tiel estas, Cito. Tiel, kiel lakto de bovino ŝanĝiĝas al kezeo, al butero, kaj al fromaĝo, kaj kiam ĝi estas lakto, ĝi ne nomiĝas kazeo, kaj kiam ĝi estas kazeo ĝi ne nomiĝas alie, tiel, el tio vi komprenas kio estas personeco. Memoru, Cito, ke tiu, kiu scias la Veron, povas ja uzi nomojn kaj terminojn kaj ne esti eraligata de ili."

